



SVISA ESPERANTO-SOCIETO
INFORMAS

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO
BERNO, 1990/03/17, 10H30-12H30
Hotelo Metropole

Partoprenis:

Jean BIPP, Claude BLANC, Sonja BRUN, Arlette DI VETTA, Erna DÖRING, Renata FILALI, Claude GACOND, Anna-Berta GERBER, Ernst GLÄTTLI, Marion GROSJEAN, Mireille GROSJEAN, Margrit GULDIN, Ueli HAENNI, Dora HEMMANN, Hans HERRMANN, Alice KESSLER, Andy E. KÜNZLI, Mario LÉPINE, Fritz LIECHTI, Hanny LIECHTI, Nicole MARGOT, Angelo MELLINI, Barbara POCHANKE,

Stanislaw POCHANKE, Heinrich RINGLI, Lilly SCHAERER, Werner SCHAUFELBERGER, Margrit SCHERER, Paul SCHERER, Hermann SCHMUTZ, Leonie SENNHAUSER, Ardachès STAKIAN, Madelèiene STAKIAN, Ernst VON MAY.

(Gastoj: Pedro MBALA QUIALA, Simona ROSSI, Gyöngyi SELYEM)

Senkulpigis: Françoise BADOUX, d-ro Arthur BAUR, d-ro Tazio CARLEVARO, Vojslav PÝTLOUN, Lina REUTEMANN, Konrad REY, Hildegard SCHOCH, Fritz WASSMANN, Dietrich M. WEIDMANN, Niklaus WEISS.

Voĉnombrantoj: Arlette DI VETTA, Nicole MARGOT.

Tagordo

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno de SES (aperinta en SER 1989-3, aprilo).

La protokolo estas akceptita unuanime (per 33 poraj voĉoj).

b) Raporto de la Centra Komitato (aperinta en SES-Informas, februaro kaj marto).

Andy KÜNZLI, ĝenerala sekretario, aldonas, ke SES lanĉis novan dimension de Eksteraj Rilatoj. Lige kun la homaj rajtoj, kiujn defendas la esperanto-movado, la agado koncernas la rilaton kun ambasadejoj de fremdaj ŝtatoj kaj kun svisaj instancoj. SES esprimis unuflanke sian kondolencon al la sovetia ambasadejo en Berno okaze de la morto de pacnobelpremiito Andrej Sacharov kaj aliflanke sian ĉagrenon al la rumana ambasadejo pro la perfortaj eventoj pasintdecembraj lanĉitaj de armeo kaj sekureca servo kontraŭ la popolo en tiu lando kaj al la usona ambasadejo pro la invado de usonaj armeanoj en Panamon. La CK de SES opinias, ke en tiuj du kazoj estis malobservitaj la homaj rajtoj. Krom tio, SES gratulis al la estro de la Svisa Polic- kaj Justicdepartamento pro ĝia decido faciligi la alvenon al Svislando de civitanoj de orienteŭropaj landoj. Tiu ĉi gratulo al la prezidanto de la Federa Konsilantaro de Svislando, prof. d-ro Arnold Koller, estis afable respondita. Andy KÜNZLI opinias, ke tiamaniere rilati kun svisaj instancoj estas multe pli fruktodone ol sendi plurpaĝan leteron al la prezidento de Svislando (aŭ al Gorbaĉov, Bush, la papo, ktp), en kiu oni defendas la aferon de esperanto. Laŭ la sperto tiaj leteroj apenaŭ havas sancon esti serioze traktitaj fare de la koncernaj instancoj.

Reage al la supraj klarigoj esprimiĝas Paul SCHERER klarigante, ke principe oni povas agnoski la vigligon de Eksteraj Rilatoj. Sed li ne povas akcepti la tonon de iuj tiaj leteroj, kiuj estis senditaj al la ambasadejoj, kiu laŭ li estas tro akra.

Claude BLANC opinias, ke la esperanto-komunumo estas tro diaspora kaj pro tio ignorita ĉe la junularo. Necesas trovi novajn formojn de la disvastiĝo de esperanto.

La raporto de la Centra Komitato estas akceptita per 30 poraj kaj 2 kontraŭaj voĉoj.

c) Financa Raporto (aperinta en SES-Informas, februaro kaj marto).

En la vigla diskuto, kiu tradicie estiĝas sub tiu ĉi tagordero kaj kiu forprenas multe da tempo, Arlette DI VETTA unue atentigas pri la kontraŭdiro en la bilanco 1989 inter la buĝetitaj membrokotizoj (9'000.-) kaj la efektivaj enspezoj (6'555.-). La kasisto Ernst VON MAY respondas, ke la kotizpetoj venis tro malfrue kaj estonte estos dissenditaj komence de la kalendara jaro. Li ankaŭ menciis, ke intertempe ankoraŭ alvenis novaj pagoj, tiel ke por 1989 pagis 192 personoj.

Ernst GLÄTTLI kritikis mankon en la cirkulero 'SES-Informas' kaj ĝenerale pridubas ilian sencon. Komprenante la problemon ĉirkaŭ la eldonado de Svisa Esperanto-Revuo, li opinias, ke la SES-membroj, kiuj nun pagas la duoblon de la tiama kotizo, povas ankaŭ atendi seriozan informservon. Ernst GLÄTTLI bedaŭras ankaŭ, ke en tiu informfolio 'SES-Informas' ne plu estas troveblaj sciigoj pri la vivo de la esperanto-grupoj en Svislando. GLÄTTLI timas, ke 'SES-Informas' povus kaŭzi malkreskon de la membraro.

Claude GACOND klarigas, ke pro manko de kunlaborantoj la cirkulero 'SES-Informas' devis esti redaktita en marĝenaj horoj, ekzemple noktaj. Pro tio aperis eraroj, kiujn oni bonvolu pardoni. Pro la demisio de la SER-redaktoro Andres BICKEL tiu gazeto denove travivas malfacilan periodon, kaj la CK urĝe serĉas la solvon de tiu krizo. 'SES-Informas' estis lanĉita por provizore kontentigi la informfluan en SES. Tiu folio ne havas la celon anstataŭi SER-n. Kompreneble la grupoj povas sendi siajn anoncojn kaj raportojn al la redakcio (SES, CP 779, 2301 La Chaux-de-Fonds), kaj ili aperos en 'SES-Informas'.

Heinrich RINGLI proponas salajri la SER-redaktoron (buĝeti 5000.-). Claude GACOND respondas, ke la CK antaŭvidas salajron por la redaktoro, sed samtempe atentigas, ke tio estas malfacila entrepreno sub la kondiĉoj de nur 200 pagantaj membroj. Kalkuloj montris, ke societo sub 800 membroj apenaŭ estas kapabla minimume, sed regule salajri la redaktoron, kiu monate pretigas gazeton.

Mireille GROSJEAN pensas, ke SES devas decidi, kio havu la prioritaton: ĉu revuo aŭ propagando.

La financa raporto estas unuanime akceptita per 32 voĉoj.

ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj (aperinta en SES-Informas, februaro).

Ĝi estas akceptita per 29 voĉoj kun danko al la kaskontrolantoj Margrit GULDIN kaj Dora HEMMANN.

d) Raporto de la komisionoj.

La raporto pri la esperanto-ekzamenoj aperis en 'Esperanto', januaro 1990. La legantoj de tiu ĉi protokolo estas petataj konsulti la koncernan revuon. La raporto, kiun resume prezentis Claude GACOND, estas akceptita per 32 voĉoj.

e) Elekto de membro de la Konflikto-Komisiono.

Demisiis d-ro Alfred WENGER kaŭze de sia maljuniĝo. Skriba kandidatiĝo ne alvenis. Dum la kunveno estas faritaj pluraj proponoj, sed la proponitoj rifuzis akcepti la nomumon. La CK okupiĝos pri tiu ĉi demando.

f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro.

La CK proponas, ke la kotizoj restu la samaj.

Claude GACOND donas klarigojn pri la heredaĵo, kiun SES povos baldaŭ akcepti. Temas pri mortintino, kies testamento heredigis al kvin filantropaj organizaĵoj, inter kiuj troviĝas Svisa Esperanto-Societo, la duonon de ŝia havaĵo. SES heredos proksimume 68'000 svisajn frankojn sen konsideri la deprenojn por la notario kaj impostoj. La heredaĵo kreskigos la konton de SES ĉe Gastejo Edmond Privat (GEP).

La nova perspektivo, kiun malfermas tiu heredaĵo vigle diskutigas la membrojn pri estontaj agadoj de SES.

La principo de la taskodivido inter SES kaj KCE estas la sekvanta: SES respondecas pri la disvastiĝo/propagando de la lingvo, dum KCE transprenas la taskojn de la instruado. En realeco, KCE dum multaj jaroj jam transprenas grandan parton de la varbado. Interalie apartenas al tiu agado la perkoresponda kurso de KCE por franc-kaj germanlingvanoj. Per tiu kurso estis gajnitaj pluraj novaj fortoj en la svisa esperanto-movado. En KCE Hamid FRIH okupiĝas pri ĝia funkciado. En 1989 tiu (por Svislando senpaga) kurso kostis al KCE 6660.- (330 informunuoj po 2.- kaj jara salajro al Hamid de 6000.- / = po 10 frankoj por unu horo). La frukto de tiu agado estas, ke jare la duono de la informpetantoj lernas esperanton kaj la duono de la lernantoj partoprenas kursojn en KCE. La celo de tiu agado estas gajni jare 1000 informpetantojn, resp. lernantojn. La ĝenerala tendenco estas, ke jare la nombro de KCE-gastoj kaj SES-membroj kreskas je trioblo. Per tio kreskas ankaŭ la kostoj.

Mirigas plurajn membrojn la nula elspezado de la por 1989 buĝetitaj 4000.- por la propagando kaj varbado. Oni principe konsentas, ke KCE faru al SES super-rigardeblajn fakturojn por enkasigi la monon, kiun KCE devis elspezi por propagandaj celoj.

Angelo MELLINI proponas, ke en la buĝeto 1990 por propagando kaj varbado aperu la cifero 8000.-. Oni akceptas tion.

Sekvas pluraj proponoj pri la demando kiel diskonigi esperanton: indiki esperanton sur poŝtopagiloj; menciigi esperanto-adresojn en telefonlibroj; munti standojn en internaciaj foiroj (ekzemple Mondolingua Ĝenevo - lige kun tio Arlette DI VETTA proponas aldoni buĝetosumon, kaj Claude GACOND revas aĉeti standon, kiu povu migri de ekspozicio al ekspozicio; Paul SCHERER intencas sendi varbfoliojn al bibliotekoj kaj al la trafikmuzeo de Lucerno. Ĉirilate Claude GACOND ne konsentas reeldoni neprilaboritajn malnovajn dokumentojn kaj Andy KÜNZLI atentigas, ke nur bonkvalitaj materialoj povas esti disponigitaj al tiaj celpublikoj).

La buĝeto 1990 estas akceptita per 32 voĉoj.

g) Proponoj.

Ne alvenis proponoj ĝis la statuta limdato.

ĝ) Diversaĵoj.

75a Universala Kongreso de Esperanto en Kubo

Inter la 14a kaj 21a de julio 1990 okazos la 75a UK de UEA en Havano, Kubo. La kongrestemo estos: Esperanto, evoluo, kultura diverseco.

Dum la UK estas antaŭvidita akcepto ĉe la svisa ambasadejo en Havano por partoprenantoj el Svislando. La svisaj gesamideanoj estos informitaj surloke en la kongresejo.

Svisaj civitanoj ne bezonas vizon por eniri Kubon.

Tuj post la UK okazos la 46a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Playa Girón. La antaŭkongreso kaj postkongreso de la UK okazos en Meksikio. Estas antaŭviditaj flugkaravanoj de Eŭropo al Havano. Informoj sekvas en 'SES-Informas'. Interesiĝantoj bonvolu kontakti kun Andy KÜNZLI (adreso: Zumhofstr. 22, 6010 Kriens. Tel. 041 45 55 83).

Kuba ambasadejo en Svislando: Seminarstr. 29, 3006 Berno. Tel. 031 44 48 34/44 48 35.

Rumana Esperanto-Asocio restarigita

Laŭ informo el Rumanio, en Bukareŝto januare estis restarigita Rumana Esperanto-Asocio. Kiel sciante, dum la tempo de la totalismo en Rumanio esperanto estis kvazaŭ malpermesita. La rumanaĵoj nur malfacile povis kontakti kun alilandaj samideanoj. Gastigi ilin ĉe si hejme estis malpermesite. De tempo al tempo esperantaĵoj trapenetris la doganejon, kiu severe konfiskis ĉion suspektan. Rumanaĵoj esperantistoj ne kuraĝis skribi al eksterlandanoj. La forigo de la kruela reĝimo en decembro 1989 esperigas la homojn en Rumanio. Malgraŭ la tre malfacilaj politika kaj ekonomia situacioj en la lando, diversaj movadoj revivigas sian aktivecon. Inter ili la esperantistoj.

Por iom kontribui al la rekomenco de la rumaniaj esperantistoj, estis kolektita mono okaze de la pasinta ĝenerala kunveno de SES marte en Berno. La ricevita sumo estas 120 svisaj frankoj. Koran dankon al la donacintoj. La mono ne estos sendita al UEA kiel antaŭvidite, sed konservita ĉe la ĝenerala sekretario de SES. Intertempe li informis la respondeculojn de Rumana Esperanto-Asocio pri la monkolekto sondante pri la bezonoj, kiujn havas la nova asocio. Surbaze de la ricevota respondo SES organizos la ekspedon de konkretaj aĵoj al Rumanio (libroj, papero, skribiloj, lernmaterialoj, k.s.) Tre verŝajne SES uzos la kanalojn de la ĝemelurboj de Rumanio en la kantono Neuchâtel, ekzemple la Chaux-de-Fonds. Ni informos vin pri la evoluo de tiu ĉi afero.

Protokolis Andy E. KŪNZLI

Posttagmeza programo:

Post la tagmanĝo estis prezentitaj la instalaĵoj de VIDEOTEXT kaj kiajn servojn ĝi povas alporti al esperanto, kun demonstracioj, fare de s-ro R. DICK kun esperantigoj de Angelo MELLINI kaj Franz BRÜGGER.

Post tio sekvis recitalo de Nikolin en Belgio, kiu prezentis kantojn el sia tutmonda repetuaro kaj kun premiero el la lasta kasedo 'Lulkantoj'.

* * * * *

ALIAJ INFORMOJ

Svisa Radio Internacia

Kune kun tiu ĉi cirkulero ni sendas al vi ankaŭ la plej freŝan prospekton de Svisa Radio Internacia. Oni povas senpage mendi la prospekton kvante por dissendi ĝin al siaj konatuloj. Ni atentigas ĉi tie, ke niaj esperanto-elsendoj estas ankaŭ bone aŭdeblaj en Svislando, lunde, ĵaŭde kaj sabate je 14H30, sur la kurtondoj (48.66 m/6165 kHz; 31.46m/9535 kHz. Estus ĝojige, se la esperanto-fako de SRI ricevus pli da leteroj ankaŭ de svisaj geaŭskultantoj, ĝuste en tempo, kiam oni devas pruvi, ke la esperanto-elsendoj estas tute popularaj kaj ne "sensencaj", kiel asertis ĵurnalisto pasintjare en la gazeto 'Basler Zeitung'.

Svisoj estas invititaj al Dagestano

Ĉialdone vi trovas ankaŭ informilon pri aranĝo, kiun somere organizos la esperantistoj en la urbo Maĥaĉkala en Dagestano, Sovetunio. Maĥaĉkala troviĝas en Kaŭkazo borde de la Kaspia Maro. Dagestano estas aŭtonoma respubliko, kie loĝas kelkdekoj da popoloj, kiuj apartenas al la plej diversaj gentoj (kaŭkaza, irana, turka, ktp.). En la letero, kiun sendis al ni la funkciuloj de Dagestana Esperanto-Centro, estas menciite, ke oni povos akcepti 2 homojn el Svislando **senpage** al la aranĝo, se svisoj poste akceptos du esperantistojn el Dagestano ankaŭ senpage por iu esperanto-aranĝo en Svislando. Dezirantoj veturi al iu esperanto-tendaro en Sovetunio povas sin turni laŭdezire ankaŭ al Andy KŪNZLI, kiu mem partoprenis tiajn kunvenojn en Sovetunio kaj kiu povas doni kelkajn praktikajn informojn (pri la vojaĝo, restado, ktp. Lian adreson vidu supre).

SES neniam rifuzas mondonacojn

En tiu ĉi senco ni permesas al ni aldoni poŝtopagilon por ebligi eventualajn mondonacojn, kiuj estas bonvenaj por nia ampleksa laboro, kiu kaŭzas pli kaj pli da elspezoj. La homoj, kiuj okupiĝas duonprofesie-duonhobie pri esperanto en Svislando kutime laboras senpage por esperanto aŭ ricevas modestan rekompencan. La svisa movado ankoraŭ ne kapablas normale salajri la esperanto-idealistojn, kiuj senpreten- de dediĉas multe da tempo favore al la disvastiĝo de lingvo kaj movado, kiu multloke bedaŭrinde ankoraŭ trafas al firmaj antaŭjuĝoj, kiuj tre forte malfaciligas la laboron por esperanto. Tial ni antaŭdankas ĉiujn financajn kontribuojn.

Tiun ĉi cirkuleron redaktis Andy E. KŪNZLI, La Chaux-de-Fonds, 5a de aprilo 1990.